

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:
BATALI POR VIVO

•
KAPTITOJ DE
LA FASISMO

•
HEROA
PASINTECO

•
IMPONA IDEO

•
MANPREMI
KOSMONAŬTON

•
POEZIO

•
NI RECENZAS

•
ESPERANTO
KAJ SCIENCO

•
LINGVAJ
DEMANDOJ

•
TEJO-KONGRESO

•
ENLANDA
MOVADO



BATALI POR VIVO AŬ PEREI PRO NUKLEA MILITO?



Cenotafo memore al instruistoj kaj infanoj de elementaj lernejoj, pereintaj de la atombombado en Hiroŝima.

La bulgaraj medicinistoj estas aktivaj konstruantoj de la socialisma socio kaj konsciaj defendantoj de la paco, por prevento de nuklea ekstermo de la homaro.

Lige kun la Tago de Medicinisto kaj Sanprotektado — 7-a de aprilo, la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ sin turnis al prof. d-ro Gerasim Mitrov, membro-korespondanto de Bulgara Akademio de Sciencoj, kun peto prezenti antaŭ niaj legantoj la problemon pri postsekvoj de nuklea eksplodo dum eventuala mondmilito. Ĉi-sube ni publikigas lian artikolon.

En la nuna momento por la homaro ne ekzistas pli granda danĝero ol la minaco de eventuala nuklea mondkonflikto. Ni memoras la tragikan finon de la Dua Mondmilito — la nukleajn eksplodojn super Hiroŝima kaj Nagasaki, kiuj kaŭzis nemezureblajn plagojn; la pereigon de dek miloj da homoj, pezajn postsekvojn de joniganta radiado kaj multajn aliajn. Ni scias, ke hodiaŭ en la nuklearsenaloj estas amasigitaj miloble pli potencaj nuklearmiloj, ankaŭ la detruoj pro eventuala nuklea

konflikto estos neimageble pli grandaj. Tial multaj sciencistoj avertas ŝtatestrojn kaj politikistojn, la tutan homaron, ke eventuala nuklea mondmilito ne nur neniigos milionojn da homoj kaj la akiraĵojn de la civilizo, sed endanĝerigas la vivon sur la tuta planedo.

Ĉiuj konsciaj homoj bonege komprenas la danĝeron de nuklea milito kaj la neceson defendi la mondan pacon, sed aparte proksima estas tiu problemo al la kuracistoj. Ĉar kuracistoj plej bone konas la biologiajn kaj psikologiajn mekanismojn, laŭ kiuj eventuala nuklea mondmilito transformiĝos en tragikan finon de la nuntempa civilizita mondo.

Militistoj kaj politikistoj en Usono kaj en aliaj imperiismaj landoj preparas diversspecajn „scenarojn“ pri apliko de la nuklea armilaro. Bedaŭrinde, en siaj militemaj planoj preskaŭ nenian atenton ili turnas al la problemo pri medicina helpo. La okcidentaj militstrategoj supertaksas la eblecojn garantiĝi medicinan helpon dum eventuala nuklea mondkonflikto, misinformas la popolamasojn, ke la hospitaloj, tenejoj de medicinaj materialoj kaj la medicina personaro ne suferos pro la nuklea eksplodo aŭ venos helpo de ne trafitaj regionoj. Sed tio estas absolute neebla!...

Kiel emfazas la soveta akademiano Ilin, se oni eksplodigos sur la teritorion de Eŭropo 1000 nukleajn bombojn — ĉiu kun potenco de unu megatono, jam en la unua momento (pro la detrua ondo), pereos 98 milionoj da homoj kaj pro la mortiga radiado — 58 milionoj da homoj. Proksimume 150 milionoj da homoj bezonos tujan medicinan helpon pro gravaj bruligoj, kombinitaj traŭmatoj kaj radia malsano. Sed pro manko de trinkakvo kaj nutraĵoj, pro detruo de la elektro- kaj transportreto mankos kondiĉoj por doni eĉ minimuman medicinan helpon.

En la Tria Tutmonda Kongreso de Medicinistoj kontraŭ la Nuklea Milito, okazinta en Amsterdamo en julio 1983, prof. Abrahams el Usono prezentis interesajn donitaĵojn pri la eventualaj postsekvoj de koncentrita nuklea eksplodo super Usono. Laŭ liaj kalkuloj, konsiderante la koncentriĝon de la medicinista personaro precipe en la urboj de Usono, 80% de tiuj kadroj estos ekstermitaj ĉe la unua nuklea eksplodo. Por kuracado de la trafitaj de la eksplodo 32 milionoj da homoj — el kiuj 18 milionoj suferantaj akran stadion de radia malsano, kaj 14 milionoj — kun gravaj traŭmatoj kaj bruligoj, estos necesaj 1,3 milionoj da kuracistoj, sed en tiu momento je dispono

(Sekvas sur p. 2)



KAPTITOJ DE LA FAŜISMO

La 11-an de aprilo oni celebras la Internacian Tagon de Antifaŝistoj-Politikaj Malliberuloj kaj Koncentrejanoj. Oni figure nomas ilin „Kaptitoj de la faŝismo“. La kaptitoj estis ĉiumomente je dispono de siaj turmentistoj, kiuj kruelege traktis ilin sen doni al si la penon elpensi eĉ plej bagatelan „pravigan“ pretekston. Eĉ momenta mien esprimo de iu malliberulo aŭ koncentrejano estigis kaŭzo por ke li estu senkompatate bategita, enkarcerigita en specialan ejon sen mendo, sen sufiĉa aero, en plena humideco. Precipe peza estis la vivo de la kaptitoj de l'faŝismo en la koncentrejoj de Hitlera Germanio. Sufiĉas tralegi la romanon „Nuda inter lupoj“ de Bruno Apitz, tradukitan en Esperanton, por prezenti al si la situacion de la viktimoj-antifaŝistoj. La bulgara esperantisto Naĉo Kemalov ankaŭ priskribis la teruraĵojn de la faŝista koncentrejo „Zakŝenĥauzen“ en tiama Germanio. Lia libro „Naŭ jarojn en unu el la cirkloj de la Hitler-infero“ estas kulpiga akto kontraŭ la barbaroj de Hitler, perdintaj ĉiun similecon al normalaj homoj.

En tiu tago ĉiuj honestaj homoj tra la tuta mondo esprimas sian malamon al la faŝismo de kiu ajn tipo kaj sub kiu ajn nomo. La sinceraj demokratoj kaj antifaŝistoj devas memori la terurajn lecionojn de la historio kaj ne permesi al la novaj pretendantoj pri la rolo de Hitler, Mussolini, Franco kaj aliaj faŝistaj gvidantoj realigi siajn malhumanajn planojn. La faŝismo de germana, itala, bulgara, pola, jugoslava, greka, estona, litva, slovaka, finnlanda tipo de la antaŭmilita epoko, bedaŭrinde ne prezentas nur tristan pasintecon. La socialaj fortoj, kiuj bezonas regadon de faŝista tipo, eĉ kiam nomas sin „demokratoj“, estas kaŝe aŭ malkaŝe portantoj de teroro super la popolamasojn en siaj landoj kaj subtenas ĉiun faŝistan diktaturon de la tipo de Ĉilio, Salvadoro, Sud-Afrika Respubliko k. a. La faŝista pesto ne restis en la analoj de la historio, sed estas reala minaco por la popoloj ekster la socialisma tendaro. Tial estas ege necese

ne nur memori pri tio, sed ankaŭ forte kontraŭstari la provojn pri revivigo de la faŝismo en Federacia Respubliko Germanio, en Italio, Hispanio kaj aliloke.

Jen en kio konsistas la graveco de 11-a de aprilo, la Internacia Tago de Antifaŝistoj — Politikaj Malliberuloj kaj Koncentrejanoj. Ĉiujare tiu Internacia Tago rememorigas al la vastaj popolamasoj pri la neceso akre kontraŭstari la reprezentantojn de la faŝisma ideologio kaj praktiko.

Ankaŭ esperantistoj el diversaj landoj estis viktimoj de la faŝistaj diktatoroj. En nia lando centoj da proletaj esperantistoj havis la „feliĉon“ esti politikaj malliberuloj aŭ koncentrejanoj. Sub ilia influo kaj per ilia helpo multaj antifaŝistoj lernis Esperanton kaj poste aktive partoprenis la E-movadon.

Iuj restis dum longaj jaroj kaptitoj de la faŝismo (eĉ dum 10—15 jaroj!). Aliaj estis persekutataj de la faŝista diktaturo, sed sukcesis eskapi kaj aliĝi al la partizana movado. Antaŭ 40 jaroj, je la Naŭa de Septembro 1944 multaj revenis kiel popolaj herooj. Nun la vivaj inter ili estas en la unuaj vicoj de nialanda esperantista movado, kvankam jam sufiĉe aĝaj. Ili helpas al la meza kaj juna generacioj transpreni el la sperto de la malnova antifaŝista esperantista gvardio por taŭge solvi la aktualajn taskojn de la bulgara esperantistaro.

Multaj esperantistoj — pli ol 150 personoj — pereis en la kruela armila kontraŭfaŝisma batalo. La ekzemplo, kiun ili testamentis al ni estas sublima. Ni devas altestime gardi la memoron de la heroj-antifaŝistoj kaj ĉiam havi antaŭ niaj spiritaĵoj okuloj ilian ekzemplon de kuraĝaj batalantoj, ĉar en nia paca tempo ni ne malpli ol ili bezonas civitanan kuraĝon kaj obstinon — por plene realigi la socialisman transformiĝon de nia trosuferinta en la pasinteco nacio, por energie subteni la politikon de nia ŝtato por paca mondo, sen armiloj kaj militoj.



La Industri-Stimula Domo de Gubernio Ĥiroŝima post la atomeksplodo.

(Daŭrigo de p. 11)

estos ne pli ol 5 000. Estos necesaj 6,5 milionoj da flegistinoj, sed la disponebla nombro da ili estos 35-oble malpli multa. Por intensa kuracado estos necesaj ĉirkaŭ 6 milionoj da litoj, sed Usono disponas nur pri 15 000!...

Dum la sesio de la Internacia Sanprotektita Organizaĵo en majo 1983 tre aŭtoritata komisiono el mondfamaj specialistoj, sub la prezidanteco de prof. Bergstöm (Svedio), laŭreato de Nobel-premio, prezentis ankoraŭ pli tragikajn donitaĵojn koncerne la postsekvojn de eventuala nuklea milito, en kiu estus aplikitaj nur 50% de la amasigitaj nukleaj ŝargoj (armiloj). Laŭ la kalkuloj, en la unuaj horoj pereos pli ol 1 miliardo da homoj, kaj proksimume 1 miliardo estos grave vunditaj — t. e. preskaŭ la duono de la loĝantaro de nia planedo estos ekstermita aŭ serioze damaĝita pro radiado, traŭmatoj, manko de elementaj vivkondiĉoj. . . Ĉe la cirkonstancoj de katastrofo kaj kaoso la sorto de la restintaj vivaj homoj estos neenviinda. . .

Oni ne devas forgesi ankaŭ la variajn malfruajn postsekvojn de la nuklea eksplodo, kiu damaĝos ĉiujn strukturojn de la socio, inkluzive ekonomikon, kulturon, naturmedion. Ni ne forgesu pri la aperontaj malignaj tumoroj, genetikaj postsekvoj, terglobaj ekologiaj rompoj, tergloba rompo de la ekologia ekvilibro, malsato kaj neantaŭvidebla mizero.

Kompleta analizo de la malfruaj postsekvoj de nuklea eksplodo pruvus, ke laŭ medicina-biologia, demografia kaj socia signifo elstaras

la problemoj pri lezoj ĉe infanoj, adoleskantoj, gravedaj virinoj (kaj de la feto en ties utero), kaj pri ĉiuj aspektoj de la reprodukta funkcio, rekte tuŝantaj la idaron. La infano (de la momento de koncipado ĝis la nasko, kaj poste dum ties elkresko kiel plenvolva organismo), kaj la graveda virino prave estas klasifikataj al tiuj „plej tuŝeblaj grupoj“ de la loĝantaro, plej facile vundeblaj, kiuj meritas ĉiufankajn zorgojn.

La lezoj en la feta organismo estas plej variaj, sed ili tuŝas precipe la cerbon, okulojn, skeleton, seksorganojn. Ĉe la pliparto de gravedaj virinoj en ambaŭ urboj (Ĥiroŝima kaj Nagasaki) ekestis aborto. Konsiderinde pli alta (ol ĉe normalaj kondiĉoj) estis la nombro de mortnaskitoj kaj la mortokvanto en la unuaj monatoj post la nasko.

Dum la unuaj 8 jaroj post la nuklea eksplodo super Ĥiroŝima estis observataj variaj difektoj kaj perversioj en la evoluo: a) reduktita elkresko laŭ staturo kaj pezo, reduktitaj dimensioj de la kapo kaj torako ĉe infanoj utere surradiitaj b) reteno de la mensa evoluo c) lezoj de la vidkapablo, nerva kaj endokrina sistemoj ĉe infanoj.


Ni kuracistoj bonege konscias ĉion ĉi kaj alarmas kontraŭ la furioza vetarmado, kiu altrudas grandegajn elspezojn kaj senigas la homaron de la ebleco solvadi la vivgravajn problemojn de sia soci-ekonomia evoluo. Oni elspezas grandegajn sumojn por armado, dum milionoj da homoj estas analfabetaj; pli ol 500 milionoj suferas pro malsato kaj 30% el la infanoj en la evoluantaj landoj ne havas eblecon vizitadi lernejojn.

La bulgaraj kuracistoj, kiuj sendevie sekvas la pacan politikon de la bulgara registaro kaj de la Bulgara Komunista Partio, aktive partoprenas la tutmondan movadon de kuracistoj kontraŭ la nuklea minaco. Ili ligas sian porpagan aktivadon kun la senĉesa strebo al perfektigo de siaj profesiaj konoj kaj kapabloj, por garantii ankoraŭ pli rezultodonan sanprotektadon al la bulgaraj laboruloj — sindonaj konstruantoj de la socialisma socio.

Bone konante ĉiujn aspektojn de la nuklea danĝero, al la fundamenta demando — kiel savi la mondon de nuklea katastrofo, ni kuracistoj respondas: ankoraŭ pli energie partopreni la pacbatalon kaj kontraŭstari la furiozan vetarmadon, stabiligi la proceson de serenigo de la interŝtataj rilatoj — por paca interkompreniĝo kaj kunlaborado.

Prof. d-ro GERASIM MITROV

BATALANTO POR JUSTECO



Petâr Darkev estas la plej maljuna esperantisto en urbo Samokov, veterano de la bulgara E-movado. Li estas 88-jara. Naskita en Samokov, tie li loĝas ankaŭ nun. La patro-ŝuisto kaj la patrino ankaŭ estas samokovanoj. En Samokov Petâr Darkev travivis longan parton de sia vivo. Pri la alia parto ni rakontos ĉi-sube. Tiu alia vivo memorigas al ni pri la konata heroo de V. Hugo Jan Valĵan, ĉar dum pluraj jaroj li devis marŝi antaŭ bajonetoj, en katenoj, devis travivi inkviziciojn de la geheno. Ankaŭ nun oni povas vidi postsignojn de torturoj kaj vundoj sur lia korpo. En la malliberejoj en Sofio, Burgas, Sliven, Plovdiv, Haskovo, Varna li pasigis 19 jarojn de sia vivo! Estas mirinde, ke li restis viva!

En 1918 li estis rekruto. Nur post 40 tagoj da soldatservo oni sendis lin al la fronto. Tie li tri jarojn suferis malsaton kaj malsanojn. En postmilita Bulgario ankaŭ estis malsato kaj senlaboreco. Longan tempon li restis sen laboro. En Samokov li vidis ribelon de revenintaj de la fronto soldatoj. Kaj jen, kun aliaj kamaradoj nia Jan Valĵan estis devigita ŝtele serĉi vivrimedojn de iu fabrikanto. Pro tio li estis kondamnita al morto! Tri jarojn kaj duonon li restis sola en sia mallibereja ĉelo, en katenoj. La mortverdiktan oni anstataŭigis per ĝismorta malliberigo kaj poste (okaze de la

cara edziĝfesto) — per kvinjara malliberigo.

En la malliberejo li estis unu el la aktivaj batalantoj kontraŭ la malbonaj vivkondiĉoj. En 1931 li partoprenis unuamajan manifestacion en la malliberejo. La naŭ partoprenantojn oni disigis en naŭ malliberejojn.

En Burgas Petâr Darkev provis fuĝi el la malliberejo, sed malsukcese. La prokuroro rompis sian bastonon sur lia dorso. Kaj la malliberulo estis senigita de la cara indulgo. Denove li estis enkatengita.

Esperanton Petâr Darkev komencis lerni en la malliberejo. Tie, inter la mortkondamnitaj, estis la sperta esperantisto Asen Aleksiev, kiu instruis al li la unuajn lecionojn. Li sola perfektigadis la lingvon. Oni konfiskadis kaj neniigadis liajn esperantajojn, sed li ĉiam trovis novajn. Kaj ĝis nun, pli ol 60 jarojn, Petâr Darkev konservis de li mem permane skribitan Esperanto-bulgaran vortareton. En lia domo oni povas vidi ankaŭ kelkajn rarajn librojn: „Fundamenta Krestomatio“ de Zamenhof, „Fundamento de Esperanto“ (1931) — gramatiko, ekzercaro, vortaro, „Esperanta sintakso“ de Zahariev Zahari, (1926), „Efigenio en Taŭrido“, „Rememoroj de Esperantisto“ de Ada, malnovaj tradukoj de poemoj kaj rakontoj de Ĥristo Botev, Ivan Vazov k. a. Dum sia tuta vivo Petâr Darkev praktikis Esperanton, instruis ĝin al siaj gekamaradoj.

Reveninte post 19-jara foresto en Samokov, li fariĝis membro de la loka E-societo „Rila Esperantisto“ kaj vigle aktivis en ĉiuj Esperanto-entreprenoj: renkontiĝoj, kongresoj ktp.

La neordinara, eventoriĉa vivo de Petâr Darkev estas sufiĉa kaj inda materialo por romano. Ĉu iu verkos ĝin ni ne scias. Li mem ne ŝatas paroli pri si.

Ni ekdeziris vidi liajn medalojn kaj ordenojn — merita rekompenco por lia kruda vojo de batalanto por socia justeco. Ni insistis kaj Darkev eniris en sian modestan dometon kaj revenis kun malgranda paketo enmane. Li maligis ĝin kaj ni vidis la ordenojn „9. IX. 1944 — dua grado“ kaj „Georgi Dimitrov“ kaj la jubileajn medalojn „30 jarojn socialisma revolucio“, „30 jaroj de la venko super faŝista Germanio“, „100 jaroj de la liberigo de Bulgario el sub otomana jugo“, „1300 jarojn Bulgario“.

La tempo, la historio juĝas pli juste ol la homoj.

Al tiaj multon travivintaj homoj, veraj esperantistoj, honestaj kaj bravaj civitanoj — riverencon!

ĤRISTINA VECEVA
DIMITAR DENCEV

DIGNA VIVO

(Intervjuo kun la E-veterano Ivan Draganov lige kun lia 85-jariĝo)



— *Estimata samideano Draganov, la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ elkore gratulas vin okaze de via 85-jariĝo. Ja ne ĉiu povas atingi tian honorindan aĝon!*

— Jes, mi vidis la belan mondon antaŭ 85 jaroj, la 3-an de aprilo 1899. Mi naskiĝis en la sudbulgara urbo Jambol. Miaj gepatroj kaj gefratoj estis instruistoj. Ankaŭ mi dum certa tempo estis instruisto. Pro partopreno en la preparo de la glora Septembra Ribelo en 1923 oni arestis min kaj, esploriginte mian konduton dum la ribelo, malpermesis al mi praktiki la profesion de instruisto. Mian panon mi perlaboris en sukerfabriko apud Burgas, en tabakfabriko kaj en tegolejo. En decembro 1924 mi ekoficis unue en Kârĝali, poste en Ardino kaj Kazanlâk. En la fino de 1926 mi ekloĝis en Sofio kaj fariĝis asekuristo.

— *Kiam vi ekinteresiĝis pri Esperanto?*

— En 1916 mi hazarde trovis la „Manokondukon de Esperanto“ de Georgi Oreškov kaj Ĥristo Popov. Mi tuj komencis lerni la lingvon kaj konstatis ĝian mirindan facilecon. Mi ekŝatis ĝin ĉefe pro ĝia „interna ideo“. Samideanoj mi trovis ĉie, kie mi laboris.

— *Kion vi entreprenis por sukcesigo de Esperanto?*

— Dum mi loĝis en Kârĝali mi membris en

societo „Stelo“, kiun gvidis la multmeritaj veteranoj Vasil Tenĉev kaj Georgi Gaĝev. De ili mi lernis kiel propagandi nian lingvon. En Ardino kune kun Nikola Miĥajlov kaj d-ro Ĥristenzin ni fondis la societon „Ni venkos!“ Mi gvidis kurson por komencantoj. En septembro 1925 mi transloĝiĝis en Kazanlâk, aliĝis al la loka societo „Roza Valo“ kaj komencis gvidi kurson en la Pedagogia Instituto. Dum la jarkunveno oni elektis min prezidanto de la societo kaj Ivan Sarafov — sekretario. Ni ambaŭ aranĝis ekspozicion, kiu havis grandan sukceson.

— *Kian utilon vi havis de Esperanto?*

— Mi larĝigis mian spiritan horizonton, korespondante kun esperantistoj el diversaj landoj — kun miaj korespondantoj mi interŝanĝis ideojn pri la senco de homa ekzistado, informiĝis reciproke pri la ekonomia kaj kultura stato en niaj landoj. Mi rakontis al miaj eksterlandaj amikoj pri la strebado de nia popolo al paca vivo. Dank’ al Esperanto mi faris servojn al miaj samlandanoj, liverante al ili medikamentojn.

— *Samideano Draganov, vi tre bone parolas kaj skribas en Esperanto. Kiel vi tion atingis? Ja vi estas aŭtodidakto.*

— Mi perfektigis en „Parolanta Rondo“, kiun gvidis nia ŝatata spertulo Asen Grigorov. Ĉi tiu rondo ege helpis min. Dank’ al tio mi senĝene babilas kaj senerare skribas. Mi spertis tion dum la 48-a UK en Sofio, kiam ĉiuj rondanoj metis sin je dispo de la LKK. Ni akompanis fremdlandajn kongresanojn tra nia ĉefurbo kaj montris al ili la vidindaĵojn.

— *Vian nomon ni renkontas ofte en malnovaj kajeroj de „Nuntempa Bulgario“ kaj „Bulgara Esperantisto“.*

— Jes, mi kunlaboris al ambaŭ gazetoj. Tiurilate min helpis Asen Grigorov, Violin Oljanov, Ivan Sarafov kaj Kunĉo Vălev — iamaj ĉefredaktoroj de la menciitaj gazetoj, kaj ankaŭ la nuna ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ Donĉo Ĥitrov.

— *Al kiu ĝenro apartenas viaj verkaĵoj?*

— Mi priskribas epizodojn, travivaĵojn el mia vivo. Ankaŭ pri eminentaj sociagantoj mi skribis. Ekzemple, pri Dimitâr Blagoev, la fondinto de BKP, kiun mi persone konis. Mi estis feliĉa aŭdi vervan paroladon de Georgi Dimitrov, kiam en 1921 li salutis la kongreson de la progresemaj instruistoj. Mi publikigis ankaŭ raportaĵojn pri kongresoj de BEA, pri konferencoj de instruistoj-esperantistoj ktp.

— *La redakcio dankas vin pro la intervjuo kaj ankoraŭfoje gratulas vin.*

— Mi estas kortuŝita de via atento al mi. Mi deziras al via redakcio rikolti novajn sukcesojn.

ĤRISTO GOROV

IMPONA IDEO PRI MONDORGANIZAĴO

Ciam ankoraŭ multaj homoj en la mondo opinias, ke la Ligo de Nacioj (LN), fondita en la komenco de 1918 en Genevo, estas faro de la tiama usona prezidento Thomas Woodrow Wilson. Tio ne estas tute ĝusta. Jen kion skribis lige kun tio la eminenta bulgara akademiano prof. A. Teodorov-Balan en revuo „Zarja“ („Aŭroro“), n-ro 3—4 de 1931, sub titolo „Nia Wilson“:

„Juste pritaksite, la supereco apartenas al tiu ideo, pri kiu la dokumentoj pravas, ke ĝi unua aperis en la mondon kaj ĉirkaŭiris la homan socion. En tiaj kondiĉoj, sendube estas ke la bulgaro Dimkov havas avantaĝon antaŭ la usonano Wilson, ĉar en la libreto de Dimkov ni havas la fidindan daton de la antaŭparolo al la unua eldono 1916—1917, dum pri la 14 punktoj de Wilson la mondo eksciis nur en la fino de la milito.“

Post tiuj kompetentaj vortoj, estiĝas tute klare, ke unua en la mondo teoriulo de la ideo pri Fondo de „Ligo de Nacioj“ estas neniu alia krom nia samlandano, humanisto kaj pacamanto ing. Nikola Dimkov.

Ing. Nikola Dimkov havas ankaŭ alian gravan meriton al Bulgario. Iun tagon, preterpasante la konstruaĵon-tenejon de arkivaj dokumentoj de la otomana imperio („Tefterhane“) en Istanbul, li rimarkis, ke amasego de va-


loraj dokumentoj, metitaj en sakoj, estas preta por refandado. Dimkov senprokraste avertas la bulgaran registaron, kiu siaflanke turnas atenton al lia averto kaj sendas en Istanbulon la eminentan turkologon Vladimir Todorov Hindalov. La pliparto de la dokumentoj (kvin vagonoj) estis aĉetitaj kaj transportitaj en Bulgarijon. Inter ili troviĝis ankaŭ materialoj pri la juĝproceso de la apostolo de nia libero Vasil Levski! . . .


Nikola Dimkov estas naskita en vilaĝo Gorno Brodi, regiono de urbo Ser, Makedonio. Li estas tria laŭvice el la sep infanoj de la ministro-ferajisto Dimko Stojanov Halembakov. La patro Dimko estis arda patrioto, aktiva partopreninto en la agado de la revoluciaj komitatoj por liberigo elsub otomana jugo. En lia domo, kies malsupra etaĝo servis ankaŭ kiel legejo, ofte gastis eminentaj revoluciuloj: Goce Delĉev, Jane Sandanski, Pejo Javorov. En la genealogia arbo de familio Dimkov distingiĝas la nomoj de elstaraj politikaj kaj kulturaj agantoj kiel Dimo Haĝidimov, Krăstju Belev, la popola kuracisto Petăr Dimkov k.a.

Elementan lernejon Nikola Dimkov vizitis en sia naskiĝvilaĝo; dum certa tempo li studis en Saloniko kaj poste — en Unua Knaŭba Gimnazio en Plovdiv. Kiel bonega lernanto, kun stipendio de la gimnazio Dimkov forveturas al Francio kaj en daŭro de tri jaroj (anstataŭ kvin) finas siajn studojn en la Politekniko en urbo Châlons-sur Marne (Salon sur-Marn). Oni proponas al li resti en Francio, sed li rifuzas kaj revenas Bulgarijon. La kariero de oficisto ne allogas la kapablan junan inĝenieron kaj li transloĝiĝas en Istanbulon. Tie li trovas favorajn kondiĉojn por realigo de iu lia malnova teknika ideo — konstruo (laŭ liaj propraj projektoj) de maŝino por mehanizita produktado de hufoferoj.

Venas ŝtormaj mondeventoj: la Balkana kaj Interalliancana militoj, la Unua Mondmilito. Profunde afliktita de la multnombraj viktimoj, damaĝoj, malsanoj kaj homa sufero, ing. Dimkov ĉiam pli ofte komencas pensi pri la mondproblemoj, pri estonta arango de la mondo kaj pri maniero eviti la malhumanajn, sangversajn internaciajn konfliktojn.

Post detala pristudo de la bazaj faktoroj kaŭzantaj la militojn, dum la periodo 1916—1917 li prilaboras konkretan kaj detalan „Projekto-Statuton“ por fondo de internacia pacorganizaĵo kaj publikigas ĝin en kelkaj lingvoj sub titolo „La stelo de l'konkordo“. Sian broŝuron li sendas al ĉiuj ŝtatestroj, al multaj





Projekto por emblemo de la estonta Ligo de Nacioj

tiamaj elstaraj politikaj kaj kulturaj agantoj en Eŭropo kaj Usono.

La fundamenta ideo de ing. N. Dimkov antaŭvidas fondon de „Organizaĵo de l'Popoj“ el la tuta mondo en konvena por tiu celo urbo en sendependa kaj neŭtrala ŝtato. Tiun ĉi internacian organizaĵon li nomas „Monda Konsilantaro“ kaj ĝian sidejon — „Urbo de la mondpaco“. Laŭ lia kompreno, la Konsilantaro devas stari super la ŝtatoj-membroj, por ke ĝi povu garantii ekvilibron de la rajtoj kaj devoj de ĉiuj — ne grave ĉu grandaj aŭ malgrandaj ili estas. La organizaĵo devis esti finance subtenata de la ŝtatoj-membroj, kaj kiel membroj de la Konsilantaro devis esti elektataj eruditaj homoj de alta moralo. En sia verko Dimkov proponas, ke la Supera Organo de l'Paco konsistu el tri sektoroj kaj 24 departementoj, al kiuj estu komisiite aranĝi laŭ paca maniero ĉiujn tutmondajn politikajn, jurajn kaj religiajn malakordojn.

„La konkordo inter ĉiuj popoloj, — skribas Dimkov, — estas la ununura vojo al progreso, bonstato kaj daŭra paco. La monrimedojn, kiujn oni apartigas por tiu althumana celo, estus kvazaŭ guteto en la maro kompare kun la miliardoj elspezataj por militpreparoj, samkiel por restarigado de la detruoj post militoj. . .

Pri la kontribuo de Nikola Dimkov al la defendo de monda paco kaj al lia patrolando Bulgario atestas dokumento de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj de 16. 3. 1981, sendita al lia nepo Ĥaralampi Popatanasov. El tiu dokumento evidentiĝas, ke la komisiono, kiu okupiĝis pri ordigo de la landlimoj de la ŝtatoj-venkitoj post la Unua Mondmilito, ĉekape kun la tiama usona prezidento Wilson, elmontris favoran rilaton al Bulgario dank'al

la kulaboro de ing. Dimkov kun prezidento Wilson pri fondo de „Ligo de Nacioj“.

Antaŭ nelonge en Genevo aperis kolekto de materialoj de UN lige kun la 100-jariĝo de bulgaraj-svisaj interrilatoj. La kolekto konsistas el 11 ĉapitroj. Ĉapitro 5 estas dediĉita al la problemoj de paco. En ĉi tiu ĉapitro estas publikigitaj diversaj materialoj, senditaj de Ĥaralampi Popanastasov — nepo de Nikola Dimkov: biografio de N. Dimkov kun lia foto, la tuta „Projekto-Statuto“ de „Ligo de Nacioj“ kaj artikolo de Ĥ. Popanastasov. La libro estas luksa kaj eleganta eldono, kiun oni dissendis al ĉiuj kulturcentroj en la mondo kaj al la misioj de la ŝtatoj-membroj de UN en Novjorko, Genevo, Parizo kaj Vieno.

Ing. Nikola Dimkov tragike pereis ĉe aŭto-akcidento en 1937. Hodiaŭ ni povas diri, ke lia granda ideo estas enkorpigita en la de li revata Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj (UN) kaj ĝi daŭre vivas en la spirito de la internaciaj renkontiĝoj en Helsinki, Madrido kaj Stokholmo por paca interkompreniĝo kaj kunlaborado inter la popoloj, en la kontribuo de lia patrolando Bulgario por konservo de la monda paco.

Admirinda estas la faro de Nikola Dimkov — unua teoriulo de la ideo pri fondo de Organizaĵo de la Nacioj.

(Laŭ materialoj de Ĥaralampi Popanastasov kaj de d-ro Ivan Popov)

NOVA INTERNACIA E-ASOCIO FONDITA

Post trijaraj klopodoj, dum la pasintjara aŭtuna Renkontiĝo de Slavoniaj Esperantistoj estis fondita Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj (IAHE). Oni elektis jenan provizoran estraron: Prezidanto — prof. d-ro Robert R. Robertson (Aŭstralio), vicprezidantoj — ing. Kenet R. Jones (Usono), d-rino Lina Gabrielli (Italio), Nikolaj Grišin (Sovetunio), sekretario — Dušan Adnadj (Jugoslavio).

Ekde 1984 ekaperos gazeto „Voĉo de handikapuloj“ 6-foje jare, en granda formato, lukse presita. Abonprezo: 5 us. dolaroj, 12 ned. gld. aŭ egalvaloro. Tiun gazeton redaktas Dušan Adnadj kaj Vujadin Lukić el Jugoslavio.

Ni invitas ĉiujn esperantistojn kaj ne-esperantistojn helpi la novan Asocion, aliĝi al ĝi kaj aboni la novan gazeton. Pri ĉio ĉi informas: „Voĉo de handikapuloj“, YU-56227 Borovo, Skolska ul. 25, Jugoslavio.

La internacia renkontiĝo de ICEM (Kooperativa Instituto por Moderna Lernejo) okazos de la 8-a ĝis la 19-a de julio 1984 en la nordorienta parto de Francio, apud Vosges-montaro. Informas: Paul Poisson, 239 rue Victor Hugo, St-Cyr-sur Loire, F-37100 Tours, Francio.

Biblioteka E-grupo (Miškolec-23, pf. 101, H-3523, Hungario, serĉas ĉiulandajn E-grupojn, kiuj povas abonigi por nia grupo E-gazetojn aŭ interŝanĝi E-librojn.

MANPREMI KOSMONAŬTON

En relative mallonga tempo oni alkutimiĝis al la epokofara fenomeno — la kosmonaŭtiko. Tio estas tute natura: ja preskaŭ ĉiumonate oni aŭdas aŭ legas pri flugo de kosmonaŭto. Post la plej evoluintaj en tiu direkto ŝtatoj — Sovetunio kaj Usono, jam viciĝis tuta grupo da grandaj kaj malgrandaj ŝtatoj, kiuj ankaŭ donas sian kontribuon por konkero de la kosma spaco. Do, hodiaŭ ne estas tiel malofta okazo la renkontiĝo kun vivanta kosmonaŭto. Kaj tamen, ne tiel multaj homoj havas tiun eksterordinaran okazon persone renkontiĝi kaj paroli kun kosmonaŭto, premi lian manon kaj de proksime observi tiun tre raran reprezentanton de la homa gento, havinta la nekonatan ĝis antaŭ du jardekoj sorton — flugi al la kosmo! Des pli rara estas la okazo renkontiĝi kun kosmonaŭto-esperantisto. Nuntempe ni esperantistoj havas almenaŭ unu sameanon-kosmonaŭton — la hungaron Bertalan Fárkas.

Mi estas inter la feliĉuloj, kiuj havis okazon manpremi kosmonaŭton kaj paroli kun li. Tiu ĉi kosmonaŭto ne estis kiu ajn — li estis kosmonaŭto n-ro 2 German Titov. Mi vidis



Soveta kosmonaŭto German Titov

de proksime kaj aŭskultis ankaŭ la pioniron de la kosma flugo — la legendan unuan kosmonaŭton en la mondo Jurij Gagarin, al kiu German Titov estis duoblulo. Post nelonga tempo ankaŭ li flugis kaj estiĝis objekto de miro kaj estimo fare de la tuta homaro.

Mia renkontiĝo kun li okazis en signifoplena jaro — la 50-a jubileo de Unuiĝo de Sovetaj Socialistaj Respublikoj. Kiel prezidanto de MEM, mi partoprenis internacian konferencon dediĉitan al la amikeco kun Sovetunio kaj la granda soveti popolo. Dum tiu konferenco, antaŭ kiu mi faris paroladon en la nomo de MEM, mi konatiĝis kaj parolis kun German Titov. Min prezentis al la kosmonaŭto mia malnova konatulo kaj amiko Bojan Stepanoviĉ Rĵanov, prezidanto de la Sindikato de Sovetaj Kulturagantoj.

Sed antaŭ ol daŭrigi pri mia konatiĝo kun German Titov mi dezirus rakonti ion pri lia patro Stepan Titov, malnova soveti esperantisto. Kun Titov-patro mi renkontiĝis unuafoje en Hago dum la tagoj de la 49-a Universala Esperanto-Kongreso (1964). Li partoprenis la delegitaron de la Komisiono por Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj, ekzistanta ĉe la Prezidio de SSOD sub la prezidanteco de prof. Eŭgeno Bokarev. Salutparolojn al la kongreso en la nomo de sovetaj esperantistoj direktis Stepan Titov. Lia filo ĵus estis fluginta en la kosmon. Kiam oni prezentis lin kiel patron de German Titov — la tuta kongresaro starigis kaj aplaudis lin kaj en lia persono — lian faman filon, kosmonaŭton n-ro 2. Aŭdiĝis ankaŭ ekkrioj: „Flugu ankaŭ esperantista kosmonaŭto!“ Post preskaŭ jardeko kaj duono la bondeziro de la kongresanoj en Hago efektiviĝis!

Ni sidis kun Titov-patro sur la kongresa podio. Li atendis sian vicon por prezenti la salutojn kaj bondezirojn kaj flustris al mi, ke unuafoje aperas antaŭ universala kongreso kaj sentas sin ĝene. Mi trankviligis lin kaj li sufiĉe certe elpaŝis. Eble la plej aplaŭdata parolado estis nome la lia.

La kongresanoj kun grandega intereso observis la patron de kosmonaŭto. Kaj ili fieris, ke filo de esperantisto estis fariginta monde konata kosmonaŭto.

Dum la konversacio kun German Titov en Moskvo en 1972 mi rakontis al li pri tiu okazintaĵo en Hagokaj pri la kontenteco de la kongresanoj pro la fakto, ke German devenas el esperantista familio. Li kun afabla, tre simpatia rideto aŭskultis tiun informon.

Mi sentas min feliĉa, ke mi havis la okazon renkontiĝi kaj konversacii kun Titov-patro kaj precipe kun lia famega filo German Titov.

NIKOLA ALEKSIEV



KANTO AL LA ROZLANDO

1

Bulgario, ho rozo,
Ĝis ekstazigo por mia apoteozo
vi parfumas.
Ĉarmo via al mi lumas.
Tonoj viaj por mi lulas.
Ho rozo
de bukedo la varia kaj unika,
la lirika, Noa ŝipo de nia tempo.
Fieru, ke vi sola —
super duonmondo senkonsola —
Sufiĉas por indigi ties nomon
kaj renomon
de printempo.

2

Bulgario, mi kontemplas, perokule
viajn ŝvitofalojn,
Tiajn rozogutojn, kiuj mondspegule
freŝigas viajn petalojn —
Ĉu sur skafaldo de Vitoŝa
ĉu en Burgas, sur gruo ja kolosa.
Super plugsulkoj de Pazargik
kaj super sablejo de Balĉik.
En la tersino de Batak
en tiu de Belgradĉik.
Ĉiam ĉe fajrejoj de Dimitrovo
aŭ de Bracigovo.
Ho rozo
en feniksa metamorfozo
kiu 1300-jaras
kaj rejunas en ĉiu horo,
Viaj ĉe l' rideto ŝvitogutoj tiom karas
al mia enamiĝinta koro.

3

Bulgario, post jarcentoj de digna angor'
Venis nun via pompa disflor'.
En Velingrada pinarbaro, gepranepoj de Dionizo
laŭ miljara civilizo
verŝas al mi sian vinon.
Ĉe Smoljana roĵo, tiuj de Orfeo
kun hejma doto en la kreo
min levegas
per raĉenico
en sublimon.
Dum tra la rozaj valoj
Hajdut-verve kaj senrezerve
plu petolas kaj konsolas
la guzloj kun sakflutoj kaj kavaloj.
Mi, paŝtisto-mastro pli ol gasto,
Ĝislarme ridas pro l' festo kaj atesto
ke, de ĉi-fekundega tero, fuĝis for
humile, sen timpaloj

Ĉiaj lupoj, ŝarkoj kaj ŝakaloj.
Kvazaŭ se tiuj sorĉistovermoj de folklor'
fetore, sen cimbaloj
defalis
de la dia flor'.

4

Bulgario, panjo de mirinda eta tribo,
aŭtoro de la slava skribo,
Se mi alvenas
kaj teneras
funde via
Nur tial, ke preskaŭ sen egal'
dispompas ĉe vi lingvo internacia —
plia atesto de ĝia kampo genia.
Prafonto de antikva kulturo
lulilo de moderna futuro,
Hodiaŭ vin glorkantas mi
ne en la lingvo de mia naci'
Des pli inspire —
spirite kaj plenfide —
de nia nevelkebla Internaci'!¹³
Nek por fari devon de diplomat'
nek por negoci sur ia merkat'
Mi, kiel samidea samlingvano
kaj frato flavhaŭta el lontano,
trans montojn kaj marojn
vin adoru!

DAO ANH KHA,
Hanojo, Vjetnamio

T. ŜOŜEV

NOKTOMEZO

(Soneto)

Noktomezo. La urb' lacigita dormegas.
Sur stratoj senhomaj fajfadas la vent'.
Sendorme mi kuŝas, la koro bategas.
Mi dronas en dolĉa, narkota amsent'.
En miajn orelojn la voĉo feina
ankoraŭ karese flustradas al mi!
Ankoraŭ bruladas la kiso senfina
sur lipoj! Mi revas, revadas pri ŝi . . .
Sopire premante la vangon al vango
ni ĝuis, fandiĝis pro fajro de l'am'.
Kaj bolis, boladis en vejnoj la sango! . . .
Ho ve! Bedaŭrinde ŝi estas jam fore!
Sed restas ĉe mi rememoro kaj flam'
kaj ŝin mi eterne posedos enkor'e!

NEESPRIMEBLE MULTE MI VIN AMAS

(Soneto)

Neesprimeble multe mi vin amas,
plenplenas de tristeco mia kor'!
Kaj al ondanta maro mi similas,
animo estas maro da angor'!
Ne venu, kiam estas vi ĝojplena!
Ne volas rompi vian ĝojon mi.
Sed se vin trafos foje sort' malbena,
ho, tiam venu, venu do al mi! . . .
Sen hezitado kaj kun fido vera!
Amata mia, vin atendas mi,
per miloj da karesoj, am' sincera
mi tuj dronigos malfeliĉon vian!
Por vi gepatra domo kaj patri'
por ĉiam mi estigos koron mian!



„VILAĜO BOROVO“

Laŭdinda estas la iniciato de Bulgara E-Asocio eldoni en Esperanto la konatan romanon de Krum Velkov „Vilaĝo Borovo“. Per tiu verko, dediĉita al la glora Septembra Ribelo 1923, la legantoj informiĝas pri la heroecon de la ribeluloj en malriĉa montara vilaĝo kaj pri la kruela frakaso de la ribelo.

Post la ribelo en la lando kreigis la t. n. „septembra literaturo“ — senpera reeĥo de la evento mem kaj de ĝiaj teruraj postsekvoj: amasmortigo de ribeluloj kaj eĉ de senkulpaj homoj, bruligo de domoj kaj havaĵoj de ribeluloj, malhonorigo de virinoj kaj junulinoj. La septembra literaturo estas grava etapo en la evoluo de la bulgara literaturo ĝenerale. Ne facile alpreninte la metodon de socialisma realismo, la postseptembra literaturo alpaŝis al realisma respegulo kaj objektiva malkaŝo de la kialoj pri sociaj konfliktoj.

La poemo „Septembro“ de Geo Milev estis la unua verko, respegulinta la heroecon de la batalantoj kaj la kruelajn murdojn kaj rabadojn fare de la faŝistoj. Post „Septembro“ aperis ankaŭ aliaj verkoj de la septembra literaturo (poezio kaj belestro) de Asen Razcvetnikov, Nikola Furnaĝiev, Orlin Vasilev, Anton Straŝimirov, Hristo Jasenov, Ljudmil Stojanov, Sergej Rumjancev k. a. Ili arde defendis la ribelintojn, atakante kaj senmaskigante la faŝistajn murdistojn. Tial la puĉista ĝeneralo Vălkov sendis teruran sekretan ordonon:

„... Antaŭ ĉio oni likvidu la plej kapablajn kaj kuraĝajn disvastigantojn de tiuj ideoj — la intelektularon! En plej mallonga limtempo oni neniigu ĉiujn iliajn gvidantojn — kulpajn kaj senkulpajn...“ Tiel pereis (precipe dum la „aprilaj eventoj“ 1925) multaj poetoj, verkistoj, ĵurnalistoj, popolfrontaj deputitoj kaj gvidantoj. Sen postsigno malaperis (t. e. pereis en la Direkcio de Polico) la poe-

toj Geo Milev, Sergej Rumjancev, Hristo Jasenov, Nikolaj Petrini, la flama ĵurnalistoj Josif Herbst... Pafmortigitaj surstrate falis multaj aliaj, inter kiuj ankaŭ la komunista deputito Dimităr Straŝimirov (frato de la verkisto Anton Straŝimirov). En sia romano „Rondodanco“ A. Straŝimirov bildece pentris la kruelaĵojn de la puĉistoj.

En tiu vico de verkistoj estas ankaŭ la aŭtoro de la romano „Vilaĝo Borovo“ — Krum Velkov. Klaskonscia revoluciulo, li mem partoprenis en la Septembra Ribelo kaj mem elsuferis ĝiajn postsekvojn. Ĉefa temo en lia verkaro estas la Septembra Ribelo 1923. Al tiu temo estas dediĉitaj liaj rakontoj kaj la romano „Vilaĝo Borovo“.

„Vilaĝo Borovo“ estis akceptita tre favore de la laboruloj en nia lando, ĉar ĝi fidele priskribas la pezan vivon de borovanoj, ekspluatataj de monavidaj riĉuloj kaj komercistoj kaj de la ŝtato mem (per impostoj, monpunoj, sekvestroj, malaltaj salajroj). Bone estas pentritaj la ribelulaj gvidantoj Marin, Ignat kaj aliaj batalantoj, kiuj brave pereas en la flamoj de la ribelo. La aŭtoro elstare montris ankaŭ la negativajn heroojn kiel la mon- kaj sangavida riĉulo kaj komunumestro de Borovo Nako, lia filo-nutrato Vanko k. a. Tamen la ribelintoj scias, ke la frakasita ribelo ne estas la lasta batalo inter ekspluatatoj kaj ekspluatistoj. Tion la aŭtoro montras per la vortoj de la nove veninta en Borovo mekanikistokomunisto: „La miloj da freŝaj tomboj kaj larmoj de orfoj ne postulas nur venĝon, sed ankaŭ batalon, persistan kaj senĉesan, por la definitiva triumfo de nia idealo!...“

La tuta progresema mondo akre kondamnis la bulgarajn faŝistojn. Tion faris Romain Rollan, Maksim Gorkij, Albert Einstein, Apton Sinkler, Henri Barbusse kaj multaj aliaj famaj homoj de la planedo. Sed, kiel profetis Geo Milev en sia poemo „Septembro“ kaj Krum Velkov en „Vilaĝo Borovo“ — venis „la definitiva venko de nia idealo!“. La bulgaraj laboruloj finfine al militis per la helpo de la glora soveta armeo sian liberon kaj feliĉan vivon.

La romano „Vilaĝo Borovo“ estas 130-paĝa, kun kartonaj kovrilpaĝoj (la unua surhavas koloran pentraĵon), kun 12 subtitoloj kaj klarigaj notoj. Oni legas la libron flue pro la interesa enhavo kaj majstra traduko en Esperanton de la fama bulgara esperantista aktivulo kaj poeto Asen Grigorov. Por tio kontribuis ankaŭ la E-filologo Violin Oljanov kiel redaktoro de la romano.

VALORA METODIKA

GVIDLIBRO

Metodika Gvidlibro de Esperanto. Aŭtoroj: Marin Băcev kaj Mihail Elenov. Redaktoro: Haĉik Haĉikjan. Bulgarlingva eldono de la Ministerio de Popola Klerigo, 155 paĝoj, Sofio, 1983.

Dum sia 100-jara ekzistado Esperanto pruvigis sian kapablon esti interliga ĉenero de ĉiuj lingvoj kaj kulturoj. Ĝi ĉiam pli disvastigas tra la mondo kaj ankaŭ ĉe ni kaj tio necesigas preparon de multaj kvalifikitaj instruistaj kadroj kaj aperigon de metodika gvidlibro.

Responde al tiu bezono la E-instruistoj Marin Băcev kaj Mihail Elenov sistemigis sian longjaran sperton en la antaŭnelonge eldonita „Metodika Gvidlibro por E-instruistoj en la mezaj politeknikaj lernejoj“. La Gvidlibro estas redaktita de Haĉik Haĉikjan, kandidato de pedagogiaj sciencoj.

La Metodika Gvidlibro, konsistanta el du partoj kaj suplemento, estas prilaborita konforme al la postuloj de la programo kaj la instru-eduka proceso pri Esperanto.

En la unua parto oni bone klarigas la celojn kaj taskojn de instruado kaj edukado. Sendepende de tio ke la buŝparolon oni ĝuste metas en la centro de instruado, la aŭtoroj tamen devis apartigi pli da loko ankaŭ por ekspozicio de la skriba parolo, speciale dum la dua lernojaro. Kiel sciante, la buŝparolon oni ne ĉiutage uzas, sed ĉiu esperantisto, ekspoziciante certan kvanton da konoj, jam deziras korespondi, legi E-literaturon. Tial mi opinias, ke estus celkonforme, se en la Metodika Gvidlibro aŭ en aparta suplemento al ĝi trovis lokon modeloj de leteroj, mallongaj rakontoj aŭ fragmentoj el verkoj de eminentaj bulgaraj kaj alilandaj aŭtoroj (por memstara hejma ekzerco, por rakontado dum la leciono aŭ por traduko el kaj en bulgaran lingvon).

La distribuo de la instruhoroj dum la lernojaro (po 66 lernohoroj) ne respondas al la realaj ebloj. De la 15-a de oktobro ĝis la 15-a de junio estas entute 31—32 semajnoj. Konsiderante la perdon de instruhoroj (pro festotagoj kaj aliaj kaŭzoj) la jara horaro limiĝas al 60—62 lernohoroj.

Bone estas prilaboritaj la ekzercoj. Tamen por la lernantoj en 9—10-a klaso (I—II kurso) multaj el la ekzercoj estas tre elementaj, estas necese pliriĉigi, variigi kaj komplikigi ilin kaj apartigi por ili pli da loko en la gvidlibro aŭ en aparta suplemento.

En parto „Fonetiko“ la esprimon „... dum la tuta periodo de instruado en la unua jaro“

oni redaktu „dum la tuta periodo de instruado“, ĉar kvankam relative facila, la esperantan fonetikon oni ne ĉiam sukcesas bone ekspozici dum la unua jaro de lernado.

La alproprigo de la leksiko estas prilaborita tre bone, sed la bezono apliki diapozitivajn, magnetofonajn surbendigojn, skemojn kaj tabelojn estiĝas ĉiam pli aktuala, konsiderante la modernan principon de sentraduka semantiko.

Tre sukcesa estas la parto „kontrolado de la scipovoj kaj kutimoj“ sed ĝin oni povas redakti „kontrolado de scioj, scipovoj kaj kutimoj“. Kaj ĝi estu pliriĉigita per ekzemplaj taskoj por kontrolo.

Unu el la meritoj de la Metodika Gvidlibro estas la inkludo en la dua parto de ekzemplaj prilaboroj de la lecionoj konforme al la plej novaj postuloj de fremdlingva instruado. La enkonduka buŝa kurso ebligas jam en la komencaj lecionoj bone ekspozici la esperantan fonetikan sistemon. Ne hazarde la aŭtoroj turnas pli specialan atenton al la interferencoj sub influo de la gepatra lingvo kaj montras la manieron de ties forigo. Sed, ĉar la lernolibro ne estas alkonformigita al kurso konsistanta nur el laŭsence ligitaj bildoj, estus bone utiligi la ilustraĵojn en la „Enkonduka kurso“ de la lernolibro. Tio ebligas al la lernantoj, lernintaj en la 7-a kaj 8-a klaso okcidenteŭropajn lingvojn, komunikiĝi, kvankam ne intence, kun la grafikaj esprimoj de la esperanta skribsistemo, dum estos kreitaj specialaj bildlecionoj.

La enkonduka kurso kun legado kaj skribado (transira) celas bonan ekspozicion de la esperantaj skribsignoj, ilian ĝustan legadon kaj skribadon. Sed la distribuo de ties lernado (13, 7, 2, 3, 3) ne respondas al la karaktero de la lernolibro, kiu jam en la 1-a leciono („Kio estas tio?“) uzas 18 literojn, kaj 5 literoj (h, ĥ, ĵ, p, ŝ) ne trovas lokon en frazoj, sed estas prezentataj ĉe legado de apartaj vortoj en ekzercoj. Do evidentigas, ke estas necese fari novan distribuon (grupigon) ĉe prezento de la esperantaj grafikaj skribsignoj.

Ĉio supre dirita plene koncernas ankaŭ la duan gradon de instruado.

Kompreneble, la ekzemplaj prilaboroj de la lecionoj devas esti aplikata konforme al la konkretaj laborkondiĉoj kaj la aĝaj specifaĵoj de la lernantoj (de 10—12 ĝis 17-jarojn aĝaj).

Fine ni devas danki al la aŭtoroj Băcev kaj Elenov kaj al la redaktoro Haĉikjan pro la sukcesa Metodika Gvidlibro de Esperanto.

GEORGI DEJANOV

FONDO DE INTERNACIA AKADEMIO DE SCIENCJOJ

En respubliko San Marino ekde la 27-a de decembro 1983 ĝis la 7-a de januaro 1984 okazis fondo de Internacia Akademio de Sciencoj kaj Unua Scienca Universitata Semajno.

La inaŭguro okazis en la kongrespalaco de San Marino, en kiu ĉeestis du kapitan-regentoj de la respubliko, parlamentanoj, gastoj el eksterlando, pli ol 160 personoj. Inviton partopreni en la fondo de Internacia Akademio de Sciencoj kaj en la Unua Universitata Semajno de respubliko San Marino konfirmis 23 landoj el la tuta mondo, tamen ĉeestis reprezentantoj de 13 landoj. La fondita Senato-Prezidio de Internacia Akademio de Sciencoj konsistas el ĉ. 50 personoj, inkluzive de 4 el Bulgario. La kunsidojn ĉeestis nur la venintaj reprezentantoj, inter kiuj du el Bulgario — prof. d-ro Ĥristo Marinov (Supera Ekonomia-Financa Instituto — Svištov) kaj prof. d-ro Kiril Popov (Medicina Akademio — Sofio). La Senato okazigis siajn kunsidojn en ĉeesto de la ministro pri kulturo kaj klerigado de respubliko San Marino.

Oni elektis estraron de la Internacia Akademio de Sciencoj: prezidanto — prof. F. Pinacetti (Torino, Italio) kaj tri vicprezidantoj — prof. Helmar Frank (FRG), prof. V. Mužić (Jugoslavio) kaj prof. P. Neergard (Danlando). Bazo de la Akademio estas trietaĝa konstruaĵo, kie laboros la unuaj administraj oficistoj. Per speciala leĝo oni leĝigos la Internacian Akademion de Sciencoj, post kio la provizora statuto estos definitive akceptita kaj oni komencos starigi ligojn kun sciencaj akademioj kaj superaj lernejoj. Tio estis konfirmita en oficiala kunsido dum la akcepto en la parlamentejo de San Marino.

La Internacia Akademio de Sciencoj formiĝas je interfaka principo kaj ties strukturo enhavas jenajn fakojn: 1. Kibernetiko; 2. Humanismaj sciencoj; 3. Strukturaj sciencoj; 4. Filozofio; 5. Naturaj sciencoj; 6. Morfologiaj sciencoj. En la apartaj sciencoj elformiĝas sekcioj-fakultatoj, en kiuj oni elektis respektive dekanojn kaj dekanejojn.

Membroj de la Internacia Akademio de Sciencoj estas akceptataj personoj kun alta scienca grado. Laborlingvoj estas itala kaj Esperanto.

La Unua Scienca Universitata Semajno konsistis el 11 kursoj po 4 duhoraj lekcionoj. Tri kursoj tuŝis problemojn kaj specifajojn de la Internacia Lingvo Esperanto, kaj la ceteraj estis el diversaj sferoj de la scienco: „Enkonduko en la kibernetikon“ de prof. H. Frank (FRG), „Bazaj problemoj de la futurologio kaj

pedagogiko“ de prof. V. Mužić (Jugoslavio), „Ekologio de iuj marbestoj“ de doc. Van de Smet (Belgio), „Strukturo kaj evoluo de nia galaksio“ de doc. H. -M. Maitzen (Aŭstrio) k. a.

La referaĵoj kaj lekcionoj estis sufiĉe bone ilustritaj per diapozitivoj, skemoj kaj bildoj. Dum la referaĵoj kaj aparte post la lekcionoj estis viglaj diskutoj.

Kiel reprezentantoj de la bulgara scienco kaj de Bulgara Esperantista Asocio okazigis kurson de lekcionoj: prof. d-ro Ĥr. Marinov — „Modernaj ekologiaj problemoj de la trafiko“ kaj prof. d-ro Kiril Popov — „Malsanoj de la salivglando“.

Indas substreki, ke dum la organizaj kunsidoj, pritraktado de la projekto de statuto kaj estraro de la Akademio, kaj ankaŭ dum la diskutoj de la sciencaj kunsidoj oni uzis nur Esperanton, sen interpretistoj, kaj sen apartaj embarasoj aŭ malsukceso en la scienca interpretado.

La fondo de Internacia Akademio de Sciencoj en respubliko San Marino estas arango, kiu kontribuos por evoluo de la moderna scienco, interŝanĝo de scienca sperto kaj internacia kunlaboro, por unuiĝo de sciencistoj el diversaj landoj en la nomo de humaneco kaj paco.

La Internacia Akademio de Sciencoj okazigos siajn sesiojn en diversaj landoj. Por 1984 oni antaŭvidas kunsidojn en Aŭstrio. Bulgario povus esti unu el la unuaj landoj, en kiuj okazos scienca sesio de la Internacia Akademio de Sciencoj.

Prof. d-ro KIRIL POPOV

XXIII INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

VERDIKTO

Rozo kaj natura floro: „Post am'tioma jam la menso transas“

Aŭtoro: Nicolino ROSSI el Italio

Eglanterio: „Pagana himno“. Aŭtoro: Giorgio SILFER el Svislando

Violo: Ĉu fieri esti homo? Aŭtoro: Jiří KORINEK el Ĉeĥoslovakio

Honora Mencio je la Violo: „Larmoj“. Aŭtorino: Lili KOLEVA el Bulgario

Premio „Frederic Pujula i Valles“: „Bobi, li kaj ŝi...“ Aŭtorino: Rajna KONSTANTINOVA el Bulgario

Honora Mencio je la Premio „Frederic Pujula i Valles“: „La paroj stultaj“ Aŭtoro: Giorgio SILFER el Svislando

Premio „Jaume Grau i Casas“: Poemo I (el la poemaro de Ausiàs March) Aŭtoro: Abel MONTAGUT i MASIP el Katalunio, Hispanio

Premio „Artur Domènech i Mas“: Ne aljuĝita

Sabadell, la 30-an de oktobro 1983

PRI LA SIGNIFO DE LA VORTO

Ni ne parolas per vortoj. Ni parolas per frazoj. La vortoj per si mem ne havas signifon. Ili donas ian informon, sed tiu ĉi informo estas tute nesufiĉa por estigi signifon. La vortoj ricevas signifon en la frazo, aŭ, pli ĝuste, el la kunteksto. La informo de la vorto, kunigita kun la kunteksto, estigas tion, kion ni nomas „signifo“ de la vorto.

Ankaŭ pri la vorto validas tio, kio validas pri ĉio en la mondo: la principo pri la relativeco. Tiel, kiel ne ekzistas „supre“, „dekstre“, „rapide“, sed ekzistas „supre de io“, „dekstre de io“, „rapide rilate al io“, tiel oni ne povas paroli pri signifo de la apartaj vortoj, se oni ne metas ilin en ian kuntekston. Ekzemple, la bulgara vorto „knijka“ rilatas al legolibreto, revukajero, ŝparlibreto, membrokarto, ŝofordokumento. Izolite prononcita, la vorto „knijka“ vere donas ian informon. Ĝi informas, ke ne temas, ekzemple, pri birdo. Sed nur tion, ne pli. La donita informo fariĝos signifo nur tiam, kiam la vorto estos enmetita en iun kuntekston.

La kunteksto povas esti lingva aŭ eksterlingva, eksplicita aŭ implicita. Kiam mi diras: „hodiaŭ, pro la malsekeco de la ligno, mi ne povis bruligi fajron“ la kunteksto de la vorto „fajro“ estas lingva kaj eksplicita. Tiu ĉi lingva kaj eksplicita kunteksto atribuas al la vorto „fajro“ signifon kaj ĉiuj komprenas tion, kion mi diras kaj tiamaniere la interkomuniko efektiviĝas. Sed kiam, en kunveno, mi timigita, ekkrias „fajro“, la eksterlingva kaj eksplicita kunteksto atribuas al la vorto „fajro“ alian signifon kaj ĉiuj komprenas tion, kion mi diras, kaj tiamaniere la interkomuniko efektiviĝas. Kiam sur la strato bulgara milicisto stopas aŭton kaj prononcas nur la vorton „knijka“ la bulgara ŝoforo tuj komprenas tion, kion la milicisto diras. La eksterlingva kaj implicita esprimita kunteksto atribuas al la vorto „knijka“ klaran signifon kaj la interkomuniko efektiviĝas.

Se oni ne povas paroli per senkuntekstaj vortoj, des malpli oni povas paroli per „senkuntekstaj“ vorteroj. Se la informa valoro de la vorto ne sufiĉas por estigi signifon, tiom pli tio validas pri la vortero, kiu ne estas eĉ vorto. Por atingi la signifon, al la vortero estas necese unue fariĝi vorto kaj poste eniri la kuntekston.

Ekzistas inter la esperantologoj koncepto — kaj ĝi estas eĉ dominantanta — ke la radiko entenas gramatikan kategorion, do ke la informvaloro de la radiko ne estas tute malgranda. Tiu ĉi koncepto devas esti reviziita.¹ Fakte ĝi estas rezulto de etna influo. La radiko en Esperanto, kiel ĉefa materialo por kreo de la vorto, ne havas gramatikan kategorion kaj tio estas unu el la plej fundamentaj diferencoj inter Esperanto kaj la etnaj lingvoj. Ne posedante gramatikan kategorion la radiko, do, havas treege malgrandan informvaloron. Tiu ĉi malgranda informvaloro estas pliigita per transformo de la radiko en vorton. Signifon la ĉi-lastata ricevas nur post eniro en iun kuntekston.

Grava propraĵo de Esperanto estas, ke ankaŭ la malradikoj povas plenumi la funkcion de radikoj. Ni prenu kiel ekzemplon la sufiksojn. Ili havas ne nur ofician rolon. Ili havas ankaŭ informan rolon. Do, kiam ni kunigas du vorterojn, ekzemple, „kant“ kaj „ig“, ni kunigas du informojn. Tiu ĉi „duobla“ informo survoje al la formado de la vorto prenas tiun aŭ alian direkton depende de la gramatika kategorio de la vorto, al kiu ni direktiĝas.

La ĉefajo ĉe kunigo de radiko kun sufikso estas klarigi, ĉu la sufikso donas ian plian informon aldone al la informo, kiun donas la radiko. Se la sufikso aldonas nenian plian informon, ĝi ne estas necesa. Se el la radiko „kant“ mi deziras produkti verbon, per kiu mi informu, ke mi per mia voĉo prezentos ian melodion, al mi ne estas necesa la sufikso „ig“, ĉar per la vorto „kantos“ mi plene esprimos mian penson. Sed se el la radiko „kant“ mi deziras produkti verbon, per kiu mi informu, ke mi instigos mian amikon prezenti la melodion, al mi estas necesa la sufikso „ig“, kiu donos la plian informon.

Ne ĉiam estas klare, kia estas la ĝusta informo de la radiko. Pro tio ekzistas ŝanceliĝoj. Ekzemple, kia estas la informo de la radikoj „simpati“, „rezigni“, „simili“. Laŭ iuj vortaroj la verboj „simpatii“, „rezigni“, „simili“ estas transitivaj, laŭ aliaj — netransitivaj. Tiuj ĉi ŝanceliĝoj tamen ne estas tiel fatalaj, kiel iuj opinias, ĉar la kunteksto ĉiam estas sur sia posteno kaj „helpas“ kaj „korektas“ la komunikaĵon.

LJUBOMIR MIHAJLOV

¹Vidu: Ljubomir Miĥajlov, „Radiko kaj vorto en Esperanto“, „Bulgara Esperantisto“, 1983,5

40a internacia junulara kongreso 13–20 julio 1984 Swanwick, Britio

La Junulara Kongreso okazos en Swanwick, en nordorienta Britio. La IJK-anoj malpli ol 26-jaraj rajtos aliĝi senpage al la Universala Kongreso en Vankuvero, Kanado.

Pri la programo

Pluraj gvidontoj de laborgrupoj kaj prelegontoj jam anoncis sin por trakti diversajn aspektojn de la kongresa temo „Homo kaj maŝino“ kaj ni esperas vidi jenajn subtemojn en la programo:

- komputiloj
- maŝinoj en la hejmo
- teknologio kaj evolulandoj
- alternativaj vivstiloj sen maŝinoj
- transporto
- maŝinoj kaj senlaboreco
- maŝinoj kaj la lingvoproblemo (maŝina tradukado)

- maŝinoj kaj la medio (polucio)

Ni antaŭvidas ankaŭ jenajn ne-temajn erojn en la programo de la 40-a Internacia Junulara Kongreso:

- interlingvistika seminario, aranĝita kaj gvidata de Akademia Centro Interlingvistika (ni intencas, ke parto de tiu ĉi seminario estu forumo pri la rolo de la angla kaj Esperanto kiel „internaciaj lingvoj“);

- projekcio de la detektiva filmo „Angoroj“ — la unua (kaj ankoraŭ la sola) profesie produktita filmo tute en Esperanto;

- laborkurso pri anglaj popoldancoj kaj instruado ankaŭ pri aliaj danctipoj;

- seminario pri kelta kulturo: multaj partoj de Britio (en Skotlando, Kimrio, Kornvalo, Mank-insulo) estas keltaj, kun apartaj lingvoj kaj historio;

- instruado de unu aŭ ambaŭ el tiuj tipe britaj ludoj: kriketo kaj kroketo;

Ekskursoj, maskobalo kaj ĉiuj eventoj de la 40-a IJK estos vidbendigitaj. Postkongresa aranĝo en apudmara urbeto St. Bees.

Adreso de la IJK: Esperanto-Centro, 140, Holland Park Avenue, London W 11 4UF, Britio.

„Budapeŝta Informilo“, 1/1984

SUGESTOPEDIA KURSO DE ESPERANTO

Laŭ invito de Junulara Sekcio de Hungara Esperanto-Asocio kaj de s-roj Jozefo Horváth kaj Petér Rados, Marin Băcev kaj la aŭtoro havis la raran eblecon partopreni la unikan en la mondo Semajnfina Sugestopedia Esperanto-Kurson. La Kurso okazis en novembro 1983 en Holasztelek, pitoreska vilaĝeto proksime al Budapeŝto.

La Kurson partoprenis 96 geĥungaroj — junaj kaj maljunaj homoj. Organizantoj kaj kursgvidantoj estis Jozefo Horváth kaj Petér Rados. Impresis min, ke ĉiuj gekursanoj, gast-instruistoj kaj kursgvidantoj tuj post la alveno ricevis novan nomon, aŭ pli ĝuste pseŭdonomon.

En la Kurso estis aplikata sugestopedio. Oni iom miskomprenis la genian eltrovaĵon de la bulgara profesoro d-ro Georgi Lozanov kaj ĝuste pro tio ne estis brilaj rezultoj. Laŭ la organizantoj ne la komfortaj foteloj, molaj tapiŝoj, endormiga muziko kaj ruĝa ĉapo sur la kapo de la instruisto egalas sugestopedion. Laŭ ili sugestopedio estas influo sur homojn por atingi konkretan celon. Tio estas farebla per volo, kredo kaj laboro. La kursgvidantoj asertis, ke Esperanto estas lernebla kaj instruebla en kadre de unu semajno kaj por la angla, rusa, hispana aŭ alia nacia lingvo — unu monato sufiĉas.

La Kurso okazis dum du semajnfinoj kaj havis tri plenvolarajn tagojn — du sabatojn kaj dimanĉon, entute 41 horojn. Ĉio ĉi estis tiel bone planita, tiel bone organizita, ke la kursgvidantoj anticipe sciis, kion ili devas fari ĉiuminute. Kaj tion ili faris kun admirinda energio, kun enviinda fervoro kaj precizeco kaj kun senlima amo al Esperanto. Post la kurso okazis A-ekzameno. Ekzamenanto estis neniam laciĝema s-ro Alfonz Pechan. Ĉiuj ekzamenoj pasis sukcese.

Laŭ mi, la sola manko de la sugestopedia metodo estas, ke ĝi ne taŭgas por internaciaj kursoj, sed nur por naciaj. Tiurilate la Ĉe-metodo estas neanstataŭebla!

Mi esperas, ke iam ankaŭ ni en Bulgario povus realigi similan eksperimenton. En Pisanica ni havas multe pli bonajn kondiĉojn, ol en Halasztelek. Kaj ni certe havus sukcesojn!

Doc. GEORGI DIMOV

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

SOFIO

La 22-an de februaro k. j. Sofia Esperantista Kulturcentro „Maksim Gorkij“ okazigis en Sofio imponan kunvenon, dediĉitan al la tradicia Semajno de Internacia Amikeco. Ĝi okazas ĉiun lastan plenan semajnon de februaro kaj pasas sub la devizo: „Amikeco trans limoj“.

Paroladon pri la Semajno faris Liliĵa Koleva. Ŝi emfazis ĝian noblan celon — okazigi festajn kunvenojn dediĉe al la ideo pri internacia amikeco kaj kunlaboro kaj pere de ili diskonigi la Internacian Lingvon al ne-esperantista publiko. Estis menciita la okazinta paŝintjare letervespero, por kiu venis salutleteroj kaj bildkartoj el multaj landoj. Adresojn de rovoj geamikoj oni transdonis al niaj esperantistoj, por ke ili kreu kontaktojn kaj starigu amikecon trans limoj. Nun la korespondado funkcias vigle. L. Koleva tra legis interesajn eltrovaĵojn el ricevitaĵoj leteroj.

Nikola Nikolov parolis pri la Vintra Esperantista Ferio — Budapeŝto, kiu jam 13 jarojn firmigas la internacian amikecon.

Sekvis kvizo „Kiu povas respondi?“, lerte gvidata de Nikola Nikolov. Juĝkomisiono, konsistanta el du personoj: Nedka Valjaviĉarska kaj Kiril Draĵev, kontrolis la ĝustecon de la respondoj. Oni disdonis objektajn premiojn.

Estonte la estraro de Sofia Esperantista Kulturcentro „Maksim Gorkij“ dum la Semajno de Internacia Amikeco planas organizi diversajn E-aranĝojn, en kiuj partoprenos ne-esperantistoj el kulturaj institucioj kaj reprezentantoj de la Sofia socio.

EVGENI GEORGIEV

SOLENA VESPERO

La 29-an de februaro 1984 en la Esperantista Kulturcentro „Maksim Gorkij“ okazis solena vespero, dediĉita al la datreveno de liberigo de Bulgario de otomana jugo.

La Heroo de Socialisma Laboro, esperantisto-veterano s-no Nikola Aleksiev parolis pri la personeco de Vasil Levski. La heroaĵo de Vasil Levski — la plej granda bulgara revoluciulo kaj kontraŭotomana batalanto estas ligita kun nia nuntempo. Postsekvis belarta programo, farita de versaĵoj pri Vasil Levski kaj el bulgaraj popularaj kantoj.

NEDKA VALJAVIĈARSKA

LERNANTINA E-KURSO EN PISANICA

Dekok lernantinoj el urbo Ĉirpan venis en la Internacian Esperanto-Kursejon en Pisanica por ferii kaj lerni Esperanton. Dum sia restado ili plensukcese ĝuis belan vintran naturon, kantis, dancis en la diskoteko kaj diligente lernis la Internacian Lingvon. Ricevinte diplomojn de unua grado, ili forveturis el Pisanica kiel novaj esperantistinoj.

Kredeble, post la reveno hejmen ili daŭrigos plu la lingvolernadon kaj en estontaj renkontiĝoj ni vidos ilin progresintaj en Esperanto.

E. KANJOVSKA

SUMEN

La membroj de E-societo „Vekiĝo“ — Sumen, de nove festis la lastan semajnon de februaro kiel Semajnon de Internacia Amikeco.

Okazis kunveno, en kiu pri la internaciaj ligoj kaj amikeco pere de Esperanto parolis Radenko Iliev — sekretario de la societo. La ĉeestantoj kun granda plezuro aprobis la estraran decidon pri akcepto de la jenaj honoraj membroj: ing. Jurij Orlov (Herson, USSR) kaj Manfred Trene (Magdeburg, GDR) — multjaraj amikoj, kontribuintaj multon per gastadoj, prelegoj kaj publikigo de materialoj en la loka gazetaro por reciproka interkonatiĝo de la homoj el la ĝemelaj urboj.

Laŭ malnova tradicio denove ekflugis al diversaj mondpartoj varmaj amikaj leteroj kun belaj bulgaraj „martenici“, kun bondeziroj pri sano kaj paco.

CVJATKO TODOROV

NOVAJOJ EL KJUSTENDIL

Ekde oktobro 1983 en la loka gimnazio „Daskal Dimitri“ funkcias E-kurso por komencantoj. Dum la kuranta lernojaro 20 lernantinoj lernas Esperanton.

E-societo „Flamo“ malfermis ankaŭ civitanan E-kurson por komencantoj. Ĝin partoprenas 12 civitanoj. Adriana Kaljanova gvidas la kurson.

SVETOZAR MATEV

NOVAJ E-SOCIETOJ

En v. Polso Kosovo, distrikto de Ruse, en la salono de legejo „Razvitie“ („Evoluo“), okazis fonda kunveno de E-societo „Frateco“.

Referaĵon pri temo „Esperanto kaj monda paco“ faris la veterano-esperantisto Jordan Atanasov. Ĝi estis aŭskultita kun granda atento de multaj personoj. Pli ol 30 personoj enskribigis lerni la Internacian Lingvon kaj membri en la nova E-societo.

Oni elektis ĝenan estraron: prezidanto — Jordan Atanasov, sekretario — Todorka Savova, kasisto — Marijana Kostadinova kaj membroj — Dimitar Dimitrov kaj Petar Danĉev.

BOJANKA VĀRBANOVA

Laŭ iniciato de esperantistoj en urbo Peruŝtica, distrikto de Plovdiv, fine de junio 1983 estis fondita E-societo. La fonda kunveno okazis en la salono de Urba Komitato de BKP. Ĉeestis Vladimir Jelev, vicprezidanto de DE de BEA — Plovdiv kaj Kiril Nedelĉev, membro de la Buroo de UK de BKP. La ĉeestantoj entuziasme decidis doni al sia societo la nomon de Apostol Zlaĉev, partizano el Peruŝtica, kiu pereis en la batalo kontraŭ faŝismo.

La nova societo havas 12 membrojn. Ĝia prezidanto estas Stojan Zlaĉev, aktiva batalanto kontraŭ faŝismo kaj malnova esperantisto.

Ni bondeziras al la novfonditaj E-societoj viglan kaj plensukcesan agadon.

VLADIMIR JELEV

INFORMO EL RUSE

Laŭ iniciato de E-lektorino M. Belčeva el urba societo „Libero“, estis fondita Junpionira E-klubo „Kolombo de l'paco“ en elementa lernejo „Hristo Smirnen-ski“. Al ĝi aliĝis 30 ĝelernantoj.

Protektanto de la Klubo estas E-societo „Libero“ — Ruse.

Kluba estraro: Stojka Račeva (prezidantino), Irena Ilieva (sekretario) kaj Petăr Petrov (kasisto).

BORIS KAVALĜIEV



Sur la foto: Membroj de la novefondita Junpionira E-klubo „Kolombo de l'paco“ — Ruse

Foto: Kr. Bučukov

VELINGRAD INVITAS VIN

(al la 16-a INTERNACIA ESPERANTISTA SEMINARIO-FERIO 18. 09. — 28. 09. 1984)

Ni invitas ĉiujn esperantistojn, naturamikojn kaj ĉiujn ŝatantojn de la naturaj belaĵoj, kiuj bezonas kaj deziras:

Surgrimpi, Rodopi-, Rila- kaj Pirin- montarojn piede aŭ buse, **EKSKURSI** al la romantikaj ĉirkaŭaĵoj de Velingrad kaj ĝui pitoreskan naturon de la imponaj bulgaraj montaroj;

Ripozi trankvile kaj libertempe gaje en frateca, amika, samideana atmosfero;

Kuraci sin per mineralakvo en subĉiela aŭ subtegmentaj basenoj;

Perfektigi lingve, interŝanĝante pensojn, ideojn kun diverslandaj ĝesperantistoj.

Bonvolu veni en Velingrad por sunbruniĝi ĉe la bonefiko de sudaj ultraviolaj sunradioj!

Venu por gustumi la konatan bulgaran gastamon!

Por pli da informoj turnu vin al: **Manol ĈOLEV**, „Br. Krăstini“, 14, BG-4600 VELINGRAD, Bulgario.

ANONCO

Lige kun la 80-jariĝo de Varsovia Esperantista Societo ni intencas organizi ekspozicion. Bonvolu sendi esperantaĵojn — lernolibroj, afiŝoj, E-dokumentoj, revuoj kaj aliaj materialoj. Adreso: Pola Esperanto-Asocio, Varsovia Filio, str. Jasna 6, PL-00-013 Warszawa, Pollando.

TRA LA GAZETARO

EN SOFIO:

J. „Otečestven Front“ (3. II. 1984) aperigis koncizan historion de E-societo „Espero“ en u. Gorna Orjaho-vica okaze de ĝia 75-jariĝo. La artikolon verkis Kun-čo Valev. La granda ilustrita revuo „Sofia“ en sia kajero por februaro 1984 donas lokon al ampleksa artikolo de Nikola Aleksiev pri Sofio kiel centro de la E-movado en Bulgario. Du fotoj ilustras la artikolon. En j. „Železničarska Tribuna“ (22. II. 1984), eldono de Fervoja Direkcio — Sofio, aperis intervjuo kun Georgi Litov, fervojisto el Sofio, lige kun lia ekspozicio „Esperanto en la pasinto“ kaj aranĝota ekspozicio dum la antaŭstaranta 36-a IFEF-kongreso en majo en Slân-čev Brjag. Trovis lokon ankaŭ la insigno de la kongreso kaj foto de la intervjuito. La intervjuon prenis Vera Stajner.

EN LA PROVINCO:

J. „Borba“ — u. V. Târnovo (21. II. 1984) aperigis trikolumnan artikolon de Hristo Dolčinkov pri la partopreno de esperantistoj en la pacmodavo. Pri la sama temo aperigis artikolon inĝ. Maria Taševa en j. „Narodno Delo“ — u. Varna (28. II. 1984). En j. „Otečestven Zov“ — u. Vraca (24. II. 1984) Bojčo Mladenov aperigis artikolon pri la semajno „Amikeco trans landlimoj“. J. „Septemvri“ — Stara Zagora (14. II. 1984) presigis informon pri la jarkunveno de la loka E-societo „Verda Stelo“.

ALVOKO

Karaj gekamaradoj,

Omage al la 100-jara jubileo de Esperanto kaj la 80-a datreveno de la fondo de E-societo „Vekigo“ — Ŝumen, la societaj membroj en sia jarkunveno decidis donaci 62 librojn kaj gazetojn, valorajn kaj rarajn en sia plimulto, aldone al la jam transdonitaj al Bulgara Esperanto-Muzeo arkivaj fotoj, leteroj kaj aliaj materialoj pri la agado kaj vivo de la ŝumenaj esperantistoj.

Ni turnas nin nun la jena alvoko: ĉiu landa E-societo, ĉiuj unuopaj esperantistoj sekvu nian ekzemplon! Kontrolu viajn bibliotekojn kaj transdonu kiel eble plej multe da esperantaĵoj al Bulgara E-Muzeo. Ni riĉigu ĝin, por ke BEM vere estigu trezorejo de la historio kaj revoluciaj bataloj de la bulgara esperantista movado.

LA ESTRARO DE „VEKIĜO“ — ŜUMEN

NI KONDOLENCAS

La 2-an de decembro 1983 forpasis BORIS KOSTOV PENEV (naskita la 3-an de junio 1920). Li estis unu el la fondintoj de la E-societo en Gălabovo kaj multjara membro de ties estraro. Per siaj honesteco, idealismo kaj laboremo li lasis neforviŝeblan rememoron ĉe la esperantistoj el Gălabovo.

La 21-an de decembro 1983 en Plovdiv forpasis la veterano-esperantisto IVAN ZLATANOV NEDKOV, 85-jaraĝa.

LA REDAKCIO



Tra la mondo

ALVOKO

Al ĉiuj fakuloj pri kemio kaj nutraj-industrio, teknologio de laktaĵoj, viandaĵoj, trinkaĵoj, plantoleo eteroleo, pastaĵoj, cerealkonservado, aparatoj kaj maŝinoj, tabako k.s.

Multaj gekolegoj deziras fondi integran Sekcion de Kemio kaj Nutraj-Industrio ĉe ISAE.

Cefa celo de tia sekcio estos disvastigi Esperanton inter sciencistoj kaj fakuloj el la supremenciitaj branĉoj, instigi ilin apliki Esperanton kaj iom post iom akcepti ĝin kiel oficialan lingvon. Oni klopodos kontakti kaj kunlabori kun neesperantistaj scienc esploraj institutoj, organizi interŝanĝon de sperto inter fakuloj. Kunagade oni organizos konferencojn, simpoziojn k.a. Enkadre de UK de Esperanto oni organizos konferencojn de la sekcio por trakti niajn specifajn problemojn.

Kun celo multigi la nombron de samfakuloj el Bulgario, oni jam organizas E-kurson por sciencistoj en la Supera Instituto de Nutraj-Gusta Industrio en urbo Plovdiv. La rektoro kaj virektoro de tiu instituto estas pretaj kunlabori kun la Sekcio de Kemio kaj Nutraj-Industrio kaj helpi ĝian agadon. En la Scienca Instituto por Konservado de Nutraĵoj oni ankaŭ planas E-kurson.

Ni atendas diversajn proponojn fare de niaj alilandaj kolegoj rilate al nia estontalaboro. Dum la 69-a en Vankuvero oni eventuale povus okazigi organizon kunsidon kaj dum la 70-a UK en FRG en 1985 — fondi la sekcion mem kaj elekti estraron.

Ni deziras scii kiom da fakuloj interesiĝas pri la planata sekcio. Interesiĝantoj bonvolu adresi sin al FD de UEA pri Kemio kaj Nutraj-Industrio, ing. Maria Taŝeva, bl. 620, vĥ. B, ap. 54, BG—1336 SOFIO, Bulgario, kaj peti pli da informoj.

„JUNA AMIKO“ ALVOKAS

La redaktoro de E-gazeto „JUNA AMIKO“ bonvenigas kompetentajn tradukojn de la plej belaj nacilingvaj porinfanaj poemoj en Esperanto de klasikaj kaj modernaj aŭtoroj. Konvenaj estas ankaŭ la jam ekzistantaj tradukoj. Bonvolu sendi poemojn en du ekzempleroj kune kun la originala teksto al: Oldřich K níchal, Budařs, Patkó u. 3. II 19, H-2040, Hungario.

VIZITO AL ARMENIO

Grupo de 32 personoj el Sofio kaj Plovdiv vizitis Armenion. La plejmulto el ili estis armenoj, kiuj unuafoje vizitis la landon de siaj prauloj.

Mi estis la nura esperantistino en la grupo. Alveninte Erevanon, mi tuj kontaktiĝis kun esperantistoj. Mi ege ĉmiris, ĉar ties societo estas vivoplena, prospera kaj ĝiaj anoj perfekte parolas en Esperanto.

Mi renkontiĝis kun la membroj de la junulara societo, kies reprezentantino Suzanna Beglarian dediĉis al mi tutan tagon por akompani min en la fama Matenadaran — la instituto de manuskriptoj, je la nomo de Mezrop Maslotz, kiu kreis la armenan alfabeton. Tie oficas esperantistino, kiu montris al mi priesperantajn librojn en armena lingvo, eldonitajn en 1909 kaj 1930. Ĉi tie troviĝas ankaŭ la unua libro de Zamenhof.

En la domo-muzeo de akademiano Tamenjan ĉiĉerono estis esperantistino — belega knabino, kiu perfekte posedas Esperanton. La biblioteko de Tamenjan konsistas el 8000 libroj, tradukitaj en 40 lingvojn, inter kiuj estas ankaŭ bulgara lingvo.

NADJA PETROVIĆ

LATVA-ESPERANTA KONVERSACIA VORTARO

En Latvio aperis „Latva-Esperanta Konversacia Vortaro“ ĉe eldonejo „Avots“ en Rigo. Aŭtoro estas E. Jaunvalks.

En la vortaro estas 12 ĉapitroj — „Diversaj sciindaĵoj“, „Generalaj konversacioj“, „Personaj indikoj“, „Trafiko“, „La urbo“, „Kulturaj institucioj“, „Medicina helpo“, „Ripozo“ k.t.p.

Estas ankaŭ jenaj ĉapitroj „La plej ofte uzataj vortoj kaj esprimoj“, „Iom da frazeologio“ kaj resumo de la Esperanto-gramatiko.

ELMAR RATASSEPP, Estonio

10-A TUSE

La jubilea 10-a turisma semajno (TUSE) en Slovakia Paradizo, de la 21-a ĝis la 27-a de julio 1984, okazos en kampadejo Ĉingov — proksime de Spišská Nová Ves, en la orienta parto de Ĉeĥoslovakio.

Loĝado en 2—4-litaj ĉambroj en turismaj domoj. Mangado en la kampadejo. En la programo: perpiedaj ekskursoj, 2 tuttagaj perbusaj ekskursoj al Levoča, Glacia groto de Dobšiná, Altaj Tatroj, vesperaj E-programoj, amuzvesperoj, konkuradoj.

Partoprenkotizo: 800—920 Kčs.

Pliajn informojn donas kaj aliĝilojn akceptas: Peter PAVUK, Jilemnického 17/9, CS-052 01 Spišská Nová Ves.

ĈIULANDAJ PACPROPAGANDILOJ BONVENAJ

Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco daŭre kolektas ĉiulandajn kaj ĉiulingvajn porpacajn afiŝojn, flugfoliojn, fotojn, (infan)desegnaĵojn, librojn, revuojn, ĵurnalojn, lumbildojn, insignojn, gluaĵŝetojn, poŝtmarkojn, ĉiujn ceterajn pacpropagandilojn. La materialoj estas serĉataj por la jam tradiciaj internaciaj porpacaj ekspozicioj.

Bonvolu adresi ĉion al: Interklubo „Esperanto“, SU-703000 SAMARKANDO, Glavpoĉtamt, abon. ja. 76, Uzbekistano, Sovetio.

Respondo kaj laŭdezira rekompenco garantiata. La alvoko validas ĉiam. Anticipan dankon al ĉiuj kontribuantoj!



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

Ivelina Atanasova (mezlernantino) — bl. 202, vñ. B, ap. 1, BG—5500 Loveč — kun ĉi pri ĉi.
 Antoaneta Ilieva — str. „Rukaviŝnikov“ 19, BG—5500 Loveč — kun ĉi pri ĉi.
 Krasimira Petkova (lernantino en tria klaso) — bl. 207, vñ. D, ap. 8, BG—5500 Loveč — kun ĉi. kol. pm, bk, poŝkalendaretoj, insignojn buŝkukojn
 Dimităr Slavov — poste restante, BG—7000 Ruŝe — kun fraŭlino el Angolo.
 Dimităr Stojčev Dimitrov (18-jara junulo), — str. „Vasil Dimitrov“ bl. 244-A, ap. 3, BG—1404 Sofio — kun ĉi pri pentroarto, fotografio kaj filmoj.
 Bulgara E-grupo deziras korespondi tutmonde pri literaturo, muziko, teatro kaj turismo:
 Vesela Rajčeva (29-jara sinjorino) — str. „Dimităr Blagoev“ 8, BG — Sofio
 Greta Dečeva (23-jara fraŭlino) — str. „Ivajlo“ 1, BG—1000 Sofio.
 Kapka Pančeva (35-jara sinjorino) — str. „Kiril kaj Metodi“ 14, BG — 1202 Sofio.
 Krasimir Vlaev (24-jara sinjoro) — str. „8 Mart“ bl. 220, vñ. 3, ap. 32, BG—1220 Sofio.
 Nadejda Nakova (12-jara knabino) — str. „Lipov cvjat“ 7, BG — Sofio.
 Pavlina Todorova (48-jara sinjorino) — str. „Čorlu“ 4, BG—1225 Sofio.
 Rumjana Georgieva (25-jara sinjorino) — str. „St. Lepoev“ bl. 25, ap. 41, BG — Sofio.
 Svetoslav Slavov (pensiulo) — str. „Kestenova goŝa“ bl. 26, vñ. E, ap. 109, j. k. Motopista, — BG—1404 Sofio.

HUNGARIO

Molnár Margit (14-jara lernantino) — Győr, Buda u. 14, H-9023 — kun geknaboj el ĉi, kol. pm, bk.
 6 studentinoj deziras korespondi kun 20—26-jaraj gejunuloj el ĉi. Ko.una adreso: H-3300 Eger, Föiskola Matematika T.
 Khol Erika (20-jara esperantistino) — H-6500 Baja, Petöfi ut 73 — kun ĉi pri ĉi.
 Zyczha Alexander (14-jara knabo) — Bp. Kaszásdölö u. 3 VIII/74, H-1031 — kun geknaboj el ĉi.
 Oze Erzsebet (lernantino) — Szenetes, Jökai u. 168, H-6600 — kun 14—18-jaraj gelernantoj.
 Judit Biró (14-jara knabino) — Szombathely, Baratsag 15. I./4, H-9700 — kun 10-13-jaraj geknaboj.

ITALIO

Alessandro di Giusto (16-jara junulo) — Pzza Dante 29, I — 41 100 Modena — kun ĉi. pri ĉi.
 Fulvio Scarpa, Fondo Versace 3, Tr. N. 24 I — 89100 Reggio Calabria — kun ĉi, interŝ. librojn.

ENHAVO

Prof. d-ro G. MITROV. Batali por vivo aŭ pere
 pro nuklea milito II p., 2 p.
 N. ALEKSIEV. Kaptitoj de la faŝismo 1 p.
 D. DENČEV. Batalanto por justeco 3 p.
 ĤR. GOROV. Digna vivo 4 p.
 D. ĤITROV. Impona ideo pri mondorganizaĵo 5 p.
 N. ALEKSIEV. Manpremi kosmonaŭton 7 p.
 Poeziaĵoj 8 p.
 IV. KEREMIDČIEV-ESPEROV. „Vilaĝo Borovo“ 9 p.
 G. DEJANOV. Valora metodika gvidlibro 10 p.
 Prof. d-ro K. POPOV. Internacia Akademio de Sciencoj 11 p.
 L. MIĤAJLOV. Pri la signifo de la vorto 12 p.
 TEJO-kongreso en Britio 13 p.
 Doc. G. DIMOV. Sugestopedia E-kurso 13 p.
 Enlanda movado 14 p.
 Deziras korespondi III p
 R. DOJČINOV. 75 jarojn Sofia Nacia Operteatro IV p

JAPANIO

Nagajuki Kasai (25-jara preslaboristo) — 4—15—10 Wakakusaryu, Kaginocyo, Koganeisi, Tokio, 184 — kun bulgaraj gejunuloj pri scienco, lingvoj, literaturo.

MONGOLIO

Ts. Batzaja (18-jara fraŭlo), Central Post, Poste restante, Ulan-Bator — kun ĉi pri ĉi.

POLLANDO

Zygmunt Wons (35-jara inĝeniero) — Hirszfelda 6—m20, PL-02-776 Warszawa — kun Bulgario kaj aliaj landoj pri skioj, turismo, korespondado; kol. monerojn kaj pm.
 Krzysztof Piotrowski (14-jara lernanto) ul. R. Kocha 1 A, PL-51-122 Wrocław — kun ĉi, kol. ĉion ligitan kun faŭno kaj flaŭro (pm, bk, diapozitivojn, albumojn ktp.).

SOVET-UNIO

Nova E-Klubo „Prospero“ en urbo Gorĵkij deziras interŝanĝi rusajn diskojn kaj kasedojn kontraŭ Esperantaj. La propono ĉiam validas. Adreso: SU-606330, Gorĵkovsk. obl., Bol. Muraŝkino, ul. Svobody 126, Gibanov A. L.
 Gibanov Aleksandr (abituriento) — SU-606330, Gorĵkovsk. obl., Bol. Muraŝkino, ul. Svobody 126 — kun ĉi pri historio kaj lingvistiko; kol. kaj interŝ. bk, pm, muziknotojn. Respondo certa.
 Ljubov Isaeva (27-jara esperantistino) — SU-601254 ul. Komsomolskaja, 4—3, Muromcevo, Sudogodskij r., Vladimirskaja obl. — kun ĉi, sed precipe kun Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio kaj Anglio, pri kino, literaturo, teatro, muziko; kol. bk.
 Macionis Rimas (25-jara elektroteknikisto) — SU-235030 Kedainiai, A/D Nr. 2, Litovio — kun ĉi, kol. revuojn pri muziko, diskojn kaj flagetojn.

Ĉefredaktoro: Dončo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Haim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BAČEV, Vasil BOROVSANSKI, Radoslav, DOJČINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimităr ĤAĜIEV, Krăstju KARUCIN

Administranto — ASEN JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodio“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

tel. 31-70-19

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

P. K. 66

1 000 Sofio

75 jarojn Sofia Nacia Operteatro



Operkantistoj Katja Popova kaj Ljubomir Bodurov

Nia malgranda lando donis al la mondo imponan nombron da bonegaj kantistoj, kiuj glorigas la bulgaran voĉarton. La spektakloj de la Sofia Nacia Operteatro en alilando transformiĝas en festojn de alta profesia majstreco, kaj la bulgaroj Boris Hristov kaj Nikolaj Gjaurov estas la plej famaj bas-baritonoj sur la mondaj opercenejoj nuntempe.

Multaj eŭropaj landoj havas plurjarcentajn tradiciojn en la operarto, dum en Bulgario nur antaŭ 75 jaroj aperas „Sofia Operarta Societo“, kies fondintoj estas Dr. Kazakov, K. Miĥajlov-Stojan kaj Ivan Vulpe. Inter la unuaj operpektakloj estas verkoj de la komponistoj E. Manolov, maestro G. Atanasov, D. Haĝigeorgiev. Aparte elstaraj kantistoj de tiu tempo estas Ana Todorova kaj Stefan Makedonski.

Amasa sceno el la baletoj „Jana kaj ŝiaj naŭ fratoj“ de L. Pipkov



De post 1921 en Sofio ekzistas Ŝtata Operteatro, sur kies scenejo prezentas sin la konataj kantistoj Miĥail Popov, Hristo Brâmbarov, Todor Mazarov, Cvetana Tabakova, Peĉâr Zolotoviĉ, Katja Spiridonova, Konstanca Kirova, Sâbĉo Sâbev, Hristina Morfova, Maria Nikolova-Zolotoviĉ, Ilka Popova, Elisaveta Jovoviĉ k.a.

Por la belarta prospero de la bulgara operteatro multe kontribuas la rusaj orkestrodirektantoj M. Zlatin, J. Pomerancev, E. Kuper, la reĝisoroj I. Ivancov, N. Vekov kaj la kantistoj E. Jdanovskij kaj K. Karenin.

Kreigas ankaŭ bulgara voĉskolo — eminentaj operkantistoj instruas en la Ŝtata Konservatorio en Sofio, kaj iliaj edukitoj fariĝas unuaj solistoj de eŭropaj operteatroj.

La direktantoj Asen Dimitrov, Asen Najdenov kaj Atanas Margaritov helpas la prosperon de la operarto en nia lando, stabiligante la orkestron, ĥoron kaj balettrupon ĉe la Nacia Operteatro kaj per siaj altaj postuloj kontribuas por plibonigo de la ĝenerala nivelo de enscenigoj.

Rimarkinda fakto estas, ke en la Sofia Nacia Operteatro kantas bonegaj bulgaraj artistoj, kiuj ebligas subtenon de varia repertuaro kaj iliaj sukcesoj sur la eŭropaj kaj mondaj opercenejoj markas la floradon de nia muzika kulturo. La bulgara publiko ege ŝatas siajn favoratojn Nikola Nikolov, Julia Viner, Nikola Gjulev.

Sur la scenejoj de la plej grandaj operteatroj famiĝis la bulgaraj kantistoj Todor Mazarov, Elena Nikolaj, Boris Hristov, Nikolaj Gjaurov, Ljuba Veliĉkova, Rajna Kabaivanska, Ana Tomova-Sintova, Aleksandrina Miĉeva k.a. La supreniro de nia operarto daŭras plu per la sukceso de la plej juna generacio de talentaj kantistoj kiel Steĥka Evstatieva, Hristina Angelakova, Steĥka Mineva k.a., kiuj estas laŭreatoj de internaciaj konkursoj.

Mondkonataj firmaoj — produktantoj de gramofondiskoj, invitas bulgarajn operkantistojn por surbendigo de kompletaj operverkoj, por plenumo de respondecaj kantpartioj kune kun aliaj grandaj kantistoj kaj orkestroj, sub la direktado de eminentaj orkestrodirektantoj.

La gastrolado en alilando de la tuta kolekto de la Sofia Nacia Operteatro ebligas al alilandaj ŝatantoj de la operarto ekkoni la bulgaran operarton, provokas senperajn flatajn resonajn pri kantmajstreco, reĝisrado kaj scenografio fare de la objektiva kompetenta kritiko kaj sciencajn ovaciojn de la publiko.

Vere ĝojiga fenomeno en la evoluo de la bulgara kulturo estas la fakto, ke en relative mallonga periodo kreigis kaj meritis indan rekonon multaj talentaj operkantistoj kaj komponistoj.

RADOSLAV DOJČINOV